


枯 叶 杂 记

Rakontoj de Velkinta Folio

爱罗先珂著 胡愈之等译

(世汉对照)



.95

1

4.95
HYZ
2-1

12#

V. Broŝenko

RAKONTOJ DE VELKINTA FOLIO

胡愈之等译
(世汉对照)

EL POPOLA ĈINIO

P. O. Kesto 77, Beijing

Rakontoj de Velkinta Folio

TURO POR FALI

I

Ie sur tiu ĉi tero iam sub griza ĉielo vivis du grandaj nobluloj, nomo de unu estis "Granda Lumo de Sudo", nomo de alia estis "Granda Lumo de Nordo". Laŭ volo de mistera sorto ili estis najbaroj, laŭ favoro de blinda ŝanco ili estis du la plej riĉaj homoj en la lando kaj laŭ deziro de iliaj fieraj koroj ili enviis kaj malamamis unu la alian. Se ili estus du hundviroj, ili sendube tuj ĵetus sin furioze unu sur alian kaj per dentoj provus pruvi sian superecon; se ili estus du ĉinaj generaloj aŭ du ĉinaj provincestroj ili sendube tuj ekmilitus por montri sian potencon unu al alia kaj sian malsaĝecon al tuta mondo; se ili estus du eŭropaj politikistoj ili sendube ankoraŭ unufojon surprizus la tutmondon per sia malico, ruzeco kaj malnobleco; sed "Granda Lumo de Sudo" kaj "Granda Lumo de Nordo" feliĉe estis nek hundviroj, nek ĉinaj generaloj nek eŭropaj politikistoj, ili estis nur du plej riĉaj homoj en sia provinco.

Ili tiel malamamis unu la alian ke ekzemple, "Granda Lumo de Sudo" neniam eĉ volis rigardi la flankon kie troviĝis posedadoj de najbaro kaj se li turnadis sian vizaĝon tiun flankon, tio estis nur por kraĉi tien; "Granda Lumo de Nordo" konsideris sian najbaron eĉ ne inda por kraĉado; tiel noblaj, tiel fieraj ili estis.

为跌下而造的塔

胡愈之 译

(一)

在这地球面上的某地方，在灰色天空之下的某时候，有过两个大贵人。一个的名儿叫“南大光”，一个的名儿叫“北大光”。因为受神秘的命运的支配，使他们做了邻居，因为受盲目的机遇的恩宠，使他们成了那处地方的两个大富翁；又因他们都有倨傲的心，所以使他们互相嫉妒而又互相仇恨。如果他们是两头雄狗呢，他们可就不免要凶斗起来，而且要用了他们的牙齿，夸耀他们自己的权威了。如果他们是中国的两个督军或是两个省长呢，他们可就不免要相打起来，对内显出他们的威风，对外显出他们的愚蠢来了。如果他们是两个欧洲的政治家呢，他们总也有一遭儿，要用了他们的奸恶，诈伪，卑劣的手段，惊动全世界了。但是，幸喜“南大光”和“北大光”既不是雄狗，又不是中国的督军，也不是欧洲的政治家，他们只不过是他们一省里的两个最大的富翁罢了。

他们这样的互相仇恨着：譬如那“南大光”对着他的邻居庄院，是连瞧都不瞧的，除非是向那边唾吐，他才回过头向那边去；至于那“北大光”呢，对着他的邻居，竟以为连唾也不值得一唾了，他们是这样高贵而又是这样倨傲的呵。

“Granda Lumo de Sudo” havis unu filinon, oni nomis ŝin “Floro de Sudaj Ĝardenoj”. “Granda Lumo de Nordo” havis unu filon, oni nomis lin “Gloro de Nordaj Ĉieloj”.

“Granda Lumo de Sudo” neniam vidis kaj neniam eĉ pensis vidi la filon de sia najbaro, sed li ĉiam parolis pri li kiel pri monstro de l’ lando; “Granda Lumo de Nordo” neniam vidis aŭ eĉ pensis vidi la filinon de sia najbaro, sed li ĉiam nomis ŝin “Kriplulo de l’ mondo”. Tiel noblaj kaj tiel riĉaj ili estis.

La simpla popolo preterpasante la palacon de “Granda Lumo de Sudo” kriadis en laŭta voĉo la nomon de la posedanto de palaco kaj parolis en mallaŭta voĉo la nomon de lia kontraŭulo; preterpasante la palacon de “Granda Lumo de Nordo” la kamparanoj respektive rigardis ĝin, sed fiere levadis siajn nazojn kvazaŭ ili flaris rostitan porkaĵon kaj rigardis kun moko la flankon de lia kontraŭulo kaj “Granda Lumo de Sudo” aŭdante sian nomon sonantan tiel laŭte ĝojegis, li pensis, ke la kampara popolo konsideris lin pli nobla, pli riĉa ol lia najbaro; la samon ankoraŭ pensis “Granda Lumo de Nordo” kaj ridetis; ho, tiu kampara popolo sciis bone kie kaj kion diri, kie kaj kion moki!

II

Sed malgraŭ mokoj de “Granda Lumo de Nordo” “Floro de Sudaj Ĝardenoj” estis tre bela, pli bela ol iu knabino en la najbaraĵo; la filo de “Granda Lumo de Nordo” estis ankaŭ bela. Ĉar tiuj knabino kaj knabo estis solaj infanoj de siaj gepatroj, ili estis edukataj kaj zorgataj pli bone ol iaj lulilaj infanoj en iu nobela familio.

“南大光”有一个女儿，人家叫她“南园的花小姐”，
“北大光”有一个儿子，人家叫他“北天的俊官人”。

“南大光”没有见过而且不想看见“北大光”的儿子，可是他说起时，总是称他叫“地上的妖精”的；“北大光”也没有见过而且也不想看见“南大光”的女儿，可是他时常称她叫“世间的废人”的。他们是这样高贵而又是这样富饶的呵。

那些平民经过“南大光”的庄子时，提高了声音，嚷着庄主的姓名，一面却放低了声音，说着他的对敌的姓名。经过“北大光”的庄子呢，那些乡下人便又必恭必敬的注视着，而且仰着他们的鼻子，正像嗅出红烧肉的香味一般，一边呢，又瞧着他的对敌那方，露出一种讥笑的样子。“南大光”听着他的姓名高声的嚷着，心里大快乐，他想那些乡下人把他看得比他邻人更要富贵哩。那“北大光”呢，却也是同样的想着而且同样的笑着。咳，那些乡下人好不识趣，他们知道在什么地方应该怎样的恭维，在什么地方应该怎样的讥笑的呵。

(二)

“北大光”虽然讥笑她，但是“南园的花小姐”却是很美的，比四周的女孩子要美；“北大光”的儿子也是很美的。因为这两个孩子，都是他们父母的独养子，所以他们被教导着，被照管着，比别的大人家的孩子都要好多了。

从在摇篮里的时候起，他们早就学会：只爱着他们自己，贱视着贫民，仇恨着劳动和劳动者，使唤着统领着一切的人和一切的事。咳，他们真是倨傲而又尊大的贵人呵，他们真是人民中的荣华呵。

De la lulila aĝo ili jam lernis ami nur sin mem, males-timi la malriĉajn, malami laboron kaj laboristojn, ordoni kaj regi ĉiujn kaj ĉion; ho, ili estis veraj nobeloj, fieraj kaj nob-laj, ili estis glorioj de popolo.

Unutagon "Floro de Sudaj Ĝardenoj" ekvolis nepre, al-menaŭ per unu okulo, vidi "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ". Ŝi iris ŝtele al la plej malproksima limbaro kiu dividis landojn naj-barajn. La saman tagon "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ" ankaŭ ek-volis kaj ankaŭ nepre almenaŭ per unu okulo ekvidi "Kriplulo de l' Mondo"; li ankaŭ iris ŝtele al la plej malproksima lim-baro kaj ŝi vidis lin, belan, noblan, fieran, malestimantan ĉiujn kaj ĉion; kaj li vidis ŝin, ĉarman, sed ankaŭ fieran, alkutimintan ordoni aliajn.

Post tio "Floro de Sudaj Ĝardenoj" ne povis plu dormi trankvile. Ho, se li estus simpla vilaĝa knabo, certe ŝi sci-us tiam, kiel kaj kion fari, ŝi sci-us kiel igi lin tiri ŝian malgran-dan, belan rikŝon, kiel ŝanceli hamakon kie ŝi kuŝus, kiel ven-tumi ŝin per ventumilo el pavaj plumoj; ŝi sci-us kiel igi lin kanti kaj fajfi, kiel rakonti belajn fabelojn, kaj kiam li tedus ŝin, ŝi sci-us, kvankam ŝi estis deksepa, kiel elĵeti lin el ŝia palaco. Ho, se li estus nur vilaĝa knabo, ŝi sci-us bone kion kaj kiel fari, sed nun, kion fari nun? Li ja estas "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ". Ŝi ne povis trankvile dormi.

"Gloro de Nordaj Ĉieloĵ" ankaŭ ne povis plu dormi, ne povis plu ludi senzorge, li ĉiam nun pensis kaj revis vagante en sia ĝardeno. Ho, se ŝi estus kampara knabino, kvankam li estis deksepa, li certe sci-us kiel kaj kion fari, li sci-us tiam, kiel igi ŝin ridi ĝojege aŭ rideti sensone aŭ respektate admiri sin; jes, multajn aliajn li sci-us kiel igi ŝin fari, kaj kiam ŝi fariĝus tre teda, li sci-us kiel ŝin sendi ree kamparon. Jes, li sci-us tiam bonege kiel esti riĉa kaj nobla, sed nun, "Floro de Sudaj Ĝardenoj" ne estas kampara knabino. Li revis kaj pen-sis vagante en sia ĝardeno, ne povis li dormi trankvile.

•

有一天，那“南园的花小姐”忽然想看看——至少也得用了独只眼睛看——那“北天的俊官人”；她悄悄的走到两家接界的地方。那一天“北天的俊官人”也忽然想起来，要看看——至少也得用了独只眼睛看——那“世间的废人”，他也悄悄的走到两家接界的地方。于是她看见了他了，他是美秀，高贵，倨傲，卑视一切的人和一切的事；于是他也看见了她了，她也是俊美，倨傲，而又惯于使唤着别人。

从此以后，“南园的花小姐”再也不能安安稳稳的睡着了。咳，如果他是个乡下孩子呢，她那时一定知道怎样做和做什么了；她一定知道怎样叫他拉着她坐的美丽的马车了；她一定知道怎样叫他摆动着她躺的吊床了；她一定知道怎样叫他拿了孔雀毛的扇子给她打扇了；她一定知道怎样叫他唱歌，怎样叫他讲好听的故事了；要是她嫌憎他时，虽然她还不过是十七岁，但她一定会知道怎样的把他撵出去了。咳，如果他只是个乡下孩子呢，她是很知道做什么和怎样做的。但是，现在，她要怎样才好呵？他却实在是一个“北天的俊官人”；她可不能安安稳稳地睡着了。

“北天的俊官人”也不能安安稳稳的睡着了，不能自由自在的玩耍了。他只是在花园里彳亍着，思想着，惦念着。咳，如果她是个农家女孩子呢，虽然他还不过十七岁，他一定知道做什么和怎样做的了，他那时一定知道怎样使她欢笑，怎样使她微哂，怎样使她恭维他自己；是呵，他所知道能使她做的事正多着呢；而且觉得讨厌她的时候，他更知道怎样把她送回农家去了。是呵，他那时一定知道怎样的装出富贵的身分来了。但是，现在，“南园的花小姐”却不是个农家的女孩子。他在他的花园里彳亍着，思想着，惦念着；他可不能安安稳稳地睡着了。

III

Baldaŭ post tio “Granda Lumo de Sudo” mortis, mortis malgraŭ siaj sennombraj riĉaĵoj, malgraŭ sia senlima fiero; tuj poste sekvis lin ankaŭ lia najbaro. En tiu ĉi ŝanceliĝanta mondo eĉ la plej riĉaj, eĉ la plej noblaj devas morti kva-zaŭ ili estas mizeraj “kuli”. Pensante pri tio oni eĉ povas suspekti ke dioj en siaj ĉieloĵ estas pli demokrataj ol estas necese aŭ eĉ dece. “Granda Lumo de Sudo” estis metita en belan arĝentan ĉerkon; funebra procesio estis majesta; ĉiuj ploris, ĉiuj estis en malespero senkonsole, kaj post la enteriga ceremonio ĉiuj estis dividataj laŭ laŭteco de siaj ploroj, laŭ grandeco de sia malespero, kaj ĉiuj festis la feston funebran kun okuloj plenaj de larmoj; kun pokaloj plenaj de vino.

“Granda Lumo de Nordo” estis metita en oran ĉerkon, la funebra procesio estis ankoraŭ pli majesta; kaj ĉar ĉiuj ĵus havis praktikon en plorado kaj malesperado kaj spertis ĝiajn sekvojn ĉe festenaj tabloj, ĉiuj nun ploris ankoraŭ pli laŭte, ĉiuj estis ankoraŭ pli malesperaj kaj la elspezoj de funebra festeno estis duoblaj. Tiu popolo sciis kiel pli plori kaj malĝoji siajn nobelulojn.

IV

Nun “Floro de Sudaj Gardenoj” restis sole kun siaj riĉaĵoj. Kiel riĉuloj de tiu ĉi mondo kaj kredeble de ĉiuj aliaj mondoj, ŝi lernis nur ami sin mem; kiel ĉiuj virinoj en tiu ĉi mondo, ŝi pensis, nur pri vestoj, ornamoj kaj pri edziniĝo, jes, ŝi pensis pri li kaj ne povis dormi, kion fari por igi lin edziĝi je ŝi? Kaj ŝi diris al si mem: “Mi konstruos grandegan palacon el blanka marmoro, mi igos lin miri mian riĉecon

(三)

过了不久，“南大光”死了，虽然他有无量数的家私，和无穷尽的倨傲，他却终于死了。他死后，接着他的邻居“北大光”也死了。“死”真是老实不客气的呢，凭你是大富大贵的人，也和贫贱的苦力一样，都免不了要到这地步。从这样看来，就有许多人会得想起：天上的神实在是非常德模克拉西的，也许是太过于德模克拉西了罢。“南大光”被放在美丽的银质的棺材里，出殡的仪仗是非常体面；送殡的人，都号哭，悲戚，表示出垂头丧气的样子；葬礼完毕了之后，越是哭得响的，越是悲戚的，分派的钱越是多，而且大家都饮宴着丧事的筵席，眼眶里装满了热泪，杯子里斟满了美酒。

“北大光”被放在金质的棺材里，出殡的仪仗，是更要体面的多呢，而且因为刚才大家都已习练过一回号哭和举哀了，都已操演过一回在酒席上狂饮的本领了，所以这一回大家号哭得更响，哀戚得更厉害，而丧事的酒筵也加上了一倍的花费了。是呵，百姓们好不知趣，他们是知道怎样号哭怎样哀悼他们的贵人的呵。

(四)

现在“南园的花小姐”只剩了她一个人拥着她自己的财产了。她和这个世界里——也许连着一切别的世界里——的一切富人们一样，是只知爱着她自己的，她也和这个世界里的一切女人们一样，是只惦念着衣服，装饰品和婚姻的。是呵，她惦念着他，而且想得不能睡着了。她做一件什么事，才能叫 he 来做她的丈夫呢？于是她便向着自己说道：“我要用了白色大理石造成一所极大的宫殿，这样我才能够使他钦服我的豪富，便不怕他不来求我做他的老婆了。”“南园的

kaj certe li petos min esti sia edzino". Tiel pensis "Floro de Sudaj Ĝardenoj"; kaj baldaŭ aperis majesta palaco el blanka belega marmoro, oni ĝin nomis "Blanka Miraklo de Sudo".

Vidinte tiun ĉi palacon "Gloro de Nordaj Ĉieloj" ekpensis: "Mi devas superi ŝin en riĉeco, alie ŝi neniam konsentos veni al mi." Kaj li konstruis palacon pli grandan ol tio de "Floro de Sudaj Ĝardenoj". Li konstruis ĝin el blua marmoro kaj kiam ĝi estis finita, ĝi ŝajnis miraklo veninta el blua maro. Oni nomis ĝin "Blua Miraklo de Nordo". Kaj popolo diris: "Palaco de 'Floro de Sudaj Ĝardenoj' estis bela, sed palaco de 'Gloro de Nordaj Ĉieloj' estis belega."

La nobla knabino estis kolera dum tago kaj malĝoja dum nokto. Nun ŝi diris al si mem: "Mi plantigos ĝardenon kun lago en mezo, kun belaj fontanoj, kun ĉarmaj aleoj. Jes, mi ĉarmigos lin. . .". Kaj ŝi invitis ĝardenistojn de nordo kaj sudo, de oriento kaj okcidento, kaj oni komencis laboron.

Neniam neniu vidis ion pli ĉarman ol tiu ĝardeno. En ravaj aleoj zefiro petolis kun sorĉaj belfloroj, en branĉoj de strangaj bonodorantaj arboj kantis pri amo najtingalo, la belaj fontanoj el purpura marmoro murmuris ĉiam pri feliĉo, dum tago la suno baniĝis en puraj akvoj de ĉarma lageto en formo de koro, dum nokto baniĝis la luno kun steloj. Oni ĝin nomis "Songo de Suda Nokto".

"Gloro de Nordaj Ĉieloj" nun pensis: "Neniam ŝi venos al mi el tia belega ĝardeno." Kaj li invitis duoblan nombron de ĝardenistoj el nordo kaj sudo, de oriento kaj okcidento, kaj nova, pli granda, pli bela ĝardeno estis plantita kun pli mirindaj arboj kaj floroj, kun pli ravigaj aleoj, fontanoj kaj lago.

La popolo diradis: "La ĝardeno de 'Floro de Sudaj Ĝardenoj' estis mirinda, sed la ĝardeno de 'Gloro de Nordaj Ĉieloj' estas senkomparebla." Oni ĝin nomis "Revo de Norda Mondo".

花小姐”这样想着；不多时，一所美丽的白色大理石的庄严的宫殿已造成了；人家都叫它“南方的白色的灵蹟”。

“北天的俊官人”看见了这座宫殿，忽然的想起来；

“我应该使她惊服我的豪富才好，要不然，她再也不会到我这里来了。”于是他建了一所宫殿，比“南园的花小姐”的宫殿更要高大得多。他用了青色的大理石建这宫殿。完工了之后，竟像是从青海中出来的灵蹟，所以人家叫它“北方的青色的灵蹟”。于是百姓们都说：“‘南园的花小姐’的宫殿，是美丽的，但是‘北天的俊官人’的宫殿，实在更要美丽得多了。”

那尊贵的小姐在日里愤怒着，在夜里忧郁着。于是她自己说：“我要建造一个花园，当中有一个湖，四面有美丽的喷泉和凉爽的荫路。是呵，我能使他着了迷……”于是她从东西南北，四处八方招集了许多的花园匠，他们便开始了工作。

不论是谁，再也不会见过比这个更美丽的花园了。在欢乐的荫路里，惠风戏弄着妖媚的花枝；在异香的林木间，莺儿歌唱着恋爱的小曲；美丽的喷泉，从皎洁的大理石中间，不住的淙淙的道着万福；在鸡心式小湖里面洁净的流水中，日里是浴着太阳，夜里是浴着星辰和月亮。因此人家称这座花园叫“南方夜里的佳梦”。

于是“北天的俊官人”想道：“她有了这么一座大花园是再不会到我这里来了。”于是他从东西南北，四处八方招集了两倍多的花园匠，不久一座新的更大更美的花园便造起来了。花木格外的出奇，荫路，喷泉，池塘也格外的美丽而可爱。

人家都说：“‘南园的花小姐’的花园是十分出奇的，但是比起这‘北天的俊官人’的花园来，却又算不得什么了。”他们称这座新花园叫“北方世界的仙境”。

不论是谁，见了这两座花园，心里都十分的欢悦，口里

Klu ajn vidis tiujn ĝardenojn sentis feliĉon en koro, sentis admiron al ĝiaj posedantoj, nur la posedantoj ne estis feliĉaj, ne sentis la ĝojon en koro, ambaŭ sopiris en siaj ĝardenoj en kiuj fontanoj el purpura marmoro murmuris pri la feliĉo, en kiuj zefiro petolis kun sorĉaj belfloroj, en kiuj kantis najtingaloj pri amo, kaj kie dum tago la suno baniĝis en puraj akvoj de ĉarmaj lagetoj en formo de koro, dum nokto baniĝis la luno kun steloj.

Nun "Floro de Sudaj Ĝardenoj" diris al si mem: "Nun mi konstruos la turon centmetran en alteco, de tie mi povos rigardi miajn posedaĵojn, de tie ankaŭ admiros 'Revo de Norda Mondo'." Kaj baldaŭ la turo aperis centmetra en alteco. Oni ĝin nomis "Vojo al Sudaj Stelaroj". Vidinte ĝin, pensis "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ": "Neniam ŝi venos al mi, neniam almenaŭ ĝis kiam mi ne konstruas la turon pli alta." Kaj li konstruis la turon ducentmetran en alteco; oni ĝin nomis "Vojo al Nordaj Stelaroj".

V

Dum ili konstruis palacon, dum ili plantigis belajn ĝardenojn, dum ili starigis fierajn turojn pasis multe da jaroj. Kaj kiam estis finita "Vojo al Nordaj Stelaroj", ili trovis multajn blankajn harojn sur siaj kapoj, sed feliĉo estis malproksima de ili same kiel ĝi estis antaŭe.

Ununokton "Floro de Sudaj Ĝardenoj" staris malĝoje sur sia turo fieraj kaj rigardis la stelojn sur nokta ĉielo; subite ŝi vidis ke stelo plej bela falis abismon; ŝi ekkriis kaj etendis la manojn por savi la stelon falantan; ŝiaj piedoj ekglitis kaj ŝi falis abismon de centmetra belturo.

La sama okazis en "Revo de Norda Mondo", "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ" staris sur sia ducent metra belturo, li ankaŭ

都不住的赞叹，只有那园主自己心里却不快活得很。在他们的花园里，喷泉从皎洁的白石中，不住的道着万福；惠风戏弄着妖媚的花枝，鶯儿在异香的林木间，不绝的唱着恋爱的小曲；在鸡心式小湖里面洁净的流水中，日里是浴着太阳，夜里是浴着星辰和月亮。但是那园主呢，反而唉声叹气的没有一刻的欢悦了。

于是“南园的花小姐”向着自己说：“现在我要造一座一百米高的塔；从这塔上我可以瞭望我的庄子，从这塔上我也可以赏鉴那‘北方世界的仙境’。”不久塔便造好了，足足有一百米的高。人家给它取了个名字，叫作“到南方的星斗去的路”。“北天的俊官人”见了这座塔又想道：“她不会到我这里来了，除非我建造一座比这更高的塔，她才会来哩。”于是他又建了一座二百米高的塔；人家给它取了个名字，叫作“到北方的星斗去的路”。

(五)

当他们盖造宫殿，当他们建造美丽的花园，当他们建筑高耸的宝塔的时候，中间经过了许多年。当“到北方的星斗去的路”完工了之后，他们头上已有许多的白发了，可是幸福离开他们却还是和从前一样的远。

有一天晚上，“南园的花小姐”怏怏不乐的立在她的高塔顶上，瞭望着天上的众星。忽地她看见一颗极美丽的星从天空落下；她嚷了一声，想用手去救这落下来的星；她失了足，便从一百米高的宝塔上跌下来了。

在“北方世界的仙境”却也发生了同样的事：“北天的俊官人”立在他的二百米高的宝塔上面；他也望着天空；他也看见一颗美丽的星从天空落下；他也嚷起来；他也想用手

rigardis ĉielon kaj vidis plej belan stelon fali senfundan abismon; li ankaŭ ekkriis, li ankaŭ etendis la manojn por savi la stelon falantan kaj ankaŭ ekglitis kaj falis abismon de ducent metra belturo.

En "Blanka Miraklo de Sudo" oni festenis pro la morto de "Floro de Sudaj Ĝardenoj"; en "Blua Miraklo de Nordo" oni festenis la subiron de "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ".

En "Songo de Sudaj Noktoj" oni enterigis "Floro de Sudaj Ĝardenoj", en "Revo de Norda Mondo" oni enterigis "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ". Tie la fontanoj el purpura marmoro ĉiam murmuris pri la feliĉo, la najtingalo en strangaj arboj kantis pri amo, en la ravaj aleoj zefiro petolis kun sorĉaj belfloroj, kaj dum tago la suno baniĝis en puraj akvoj de sorĉaj lagetoj en formo de koro, dum nokto baniĝis la luno kun steloj.

"Floro de Sudaj Ĝardenoj" kaj "Gloro de Nordaj Ĉieloĵ" ne estis kaj ne estas unuaj kiuj elspezis sian junecon kaj tutan vivon en la konstruado, kiuj konstruis la turojn por fali de tie, kiuj konstruis grandegajn palacojn por oni festenu tie la postmortan festenon, kiuj plāntigis belegajn ĝardenojn por oni enterigu ilin tie, multaj elspezas sian junecon kaj tutan vivon en la sama maniero, mi mem estas unu el tiaj: mi stariĝis altan turon kaj falis de tie, konstruis palacon por ĝi ruiniĝu, feliĉe en falo mi ne mortigis min mem, la palaco en sia ruiniĝo ne ruinigis min, sed ĉu vi divenas la kaŭzon de tia miraklo? Se ne, mi diros al vi ĝin: la turo kaj palaco estis, almenaŭ por tiu ĉi fojo, konstruita en la aero.

去救这落下来的星，而且也失了足，也从二百米高的宝塔上跌了下来。

在“南方的白色的灵蹟”里，人家饮宴“南园的花小姐”的丧事酒；在“北方的青色的灵蹟”里，人家饮宴“北天的俊官人”的丧事酒。

人家把“南园的花小姐”葬在“南方夜里的佳梦”中，把“北天的俊官人”葬在“北方世界的仙境”中。在这两处，喷泉从皎洁的大理石中间，不住的淙淙的道着万福；鶯儿在异香的林木间，唱着恋爱的小曲；惠风在欢乐的荫路里，戏弄妖媚的花枝，在鸡心式小湖里面洁净的流水中，日里是浴着太阳，夜里是浴着星辰和月亮。

“南园的花小姐”和“北天的俊官人”委实算不得第一个呵。世间象这样的人很多着呢。世间有许多人牺牲了他们的青春，牺牲了他们的一生，以从事于建造；他们建造了高塔，为的是使自己从这塔上跌下来；他们盖造了很大很大的宫殿，为的是使人家在这里饮宴他们的丧事酒；他们建造了非常美丽的花园，为的是要把他们自己葬在这里边。牺牲了青春，牺牲了一生，去干这种可笑的事情的人，世间很多着哩，而我自己也是其中的一个：我曾经建造过一座高塔，后来便从这塔上跌下来，我曾经盖造过一所宫殿，后来却又烧毁它，可是，真要谢天谢地的，我从塔上跌下的时候，竟没有跌死，宫殿烧毁的时候，我也没有烧死了。但是，这是怎么一回事，你能猜得透吗？要是不然，我就和你说了罢：什么宫殿呀，塔呀，——至少在这一回儿——都只是些空中楼阁呵。